

Dua Kultura Semajnfino Esperantista en Renens
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 453, 1972.06.14 & 17

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Antaŭ ĵus unu monato okazis en Renens apud Lausanne la dua Kultura Semajnfino Esperantista.

A.- Tiu renkontiĝo grupigis okdekonojn da geesperantistoj el Svislando, Francio kaj Britio. La partoprenantoj estis dividitaj en kvar grupojn, kiuj havis paralelajn programojn. La manĝoj kaj parto de la sabata vespero estis komunaj.

Cl.- La grupo A kunigis la verajn esperantistojn. Por ili disvolviĝis programo kun prelegoj kaj diskutoj. La grupo B kunigis la komencantojn, kiuj deziris plu lerni la lingvon. La grupo C kunigis personojn, kiuj deziris eklerni la lingvon. Kaj fine la grupo D grupigis la infanojn. Tiuj lastaj lernis esperanton ludante, konstruante miniaturajn kastelojn kaj kantante.

A.- Ni hodiaŭ resume prezentos la enhavon de la prelegoj, kiujn prononcis Henri Vatré, Claude Piron kaj Nicole Piron antaŭ la partoprenantoj de la grupo A.

Cl.- Henri Vatré, kiu ankaŭ estas konata sub la pseŭdonomo Henri Baupierre pritraktis la temon *Esperanto dum la lastaj 50 jaroj*. Li komencis sian prelegon montrante, ke la esperanto-fenomeno ŝajnas io tute normala. Poste Henri Vatré ekzamenis la evoluon de la lingvo mem kaj de la esperanto-movado dum la lastaj 50 jaroj, periodo riĉa je eventoj.

A.- Ĉefe tri gigantoj markis nian movadon. Ili estas Ludoviko Zamenhof, la aŭtoro de la lingvo, Hector Hodler, la fondinto de Universala Esperanto-Asocio kaj Eŭgeno Lanti, la fondinto de Sennacieca Asocio Tutmonda. La tri estis homoj realismaj kun eksterordinara organizkapablo. Komuna trajto ilin unuigas : ili praktikis la lingvon anstataŭ teorii pri ĝi.

Cl.- En 1922, antaŭ 50 jaroj, Zamenhof ne plu vivis. Esperanto tiam estas tre juna. 35-jaraĝa ĝi estas. Post rapida priskribo de la tiam mondo postmilita, kiu rapide ŝanĝiĝis kaj kiu konatiĝis kun la filmarto, la radio, la ĵaz-muziko, la surrealismo kaj ekonomia krizo, Henri Vatré revenis al la mondlingva ideo memorigante, ke tiam naskiĝis la lingvo *Occidental*, kies aŭtoro estas Edgar von Wahl. Al la skismo inter la adeptoj de skemaj lingvoj kiel esperanto kaj *Ido*, kaj tiuj de la naturalismo, respondis en la esperanto-movado mem skismo inter la neŭtrala movado, kiu estis nacie organizita kaj la laborista movado, kiu estis sennacie organizita. Kiam SAT eldonis la *Plenan Vortaron de Esperanto*, tiam ĝi havis 7000 membrojn. UEA siaflanke havis 9000 membrojn.

A.- Sed baldaŭ en ambaŭ movadoj okazis skismo. En SAT okazis konfliktoj inter la sennaciistoj kaj la komunistoj, kiuj revenis iom post iom al nacieca sinteno. La neŭtrala movado eksplodis kaj ĝis post la dua mondmilito apud UEA ekzistas IEL : Internacia Esperanto-Ligo. Nur post la dua mondmilito tiuj skismoj iom post iom malaperis profite al kunlaboro inter ĉiuj movadoj.

Cl.- Inter la mondmilitoj la verkistoj ĉefe zorgis pri la kompletigo de la lingvo. Apud la *Plena Vortaro de Esperanto* aperis *Parnaso Gvidlibro*, kiu donis informojn pri la vers-tekniko kaj *Plena Gramatiko de Esperanto*, kiu provis kodigi iujn regulojn. Multaj neologismoj estis iom

post iom asimilitaj, kaj teorio pri vortfarado akceptita. Ĝin ni ŝuldas al la ĝenevano René de Saussure.

A.- Gravaj tradukoj ludis ĉefrolon : *La Sankta Biblio*, *Infero* de Dante, *belga*, *kataluna kaj svisa Antologioj*. La *Historio de Esperanto* de Privat kaj tiu de Drezen havis profundan influon sur la legantoj.

Cl.- Ĉirkaŭ la revuo *Literatura Mondo* kaj la gazeto *Esperanto triumfonta* kreigis literaturaj skoloj, kies ĉefaj aŭtoroj estas Kalocsay, Baghy, Raymond Schwartz, Waringhien. La Esperanta Akademio estis konservema, kaj ofte la akademianoj ne estis tre kompetentaj esperantistoj. Raymond Schwartz mokas pri ili :

A.- Li skribis : *Kvankam akademiano, li sufiĉe bone konas la lingvon*. Nur en 1949 Kalocsay povos eniri tiun fermitan rondon.

Cl.- En la lokaj grupoj kunvenis ĉefe krokodiloj. Tio malhelpis la disvolvigon de la parolata lingvo. Post la dua mondmilito komenciĝis la mortigado de la krokodiloj fare de la nova generacio. La konsekvenco estas la redukto de la nombro de la grupanoj.

A.- Ankaŭ dum la pasintaj jaroj la virinoj ekludis rolon. Inter ili Marjorie Boulton estas la plej konata. Al ŝi ni ŝuldas la plej bonan biografion pri Zamenhof.

Cl.- Krom tiu tre riĉenhava prelego la partoprenantoj al la Kultura Semajnfino en Renens povis ĝui pri la ankaŭ interesaj prelegoj de Claude kaj Nicole Piron. Ili parolis pri UN kaj Mond-Organizaĵo pri Sano, kies laboro estas malbone konata. Ambaŭ deĵoris en tiuj organizaĵoj kiel tradukistoj. Kaj fine Claude Piron prelegis pri la ĉina lingvo, kiu multilate tiom similas al esperanto. Ni tre esperas povi aŭdigi al vi intervjuojn koncerne tiun temon. Jen kelkaj vortoj pri tiu lasta prelego :

A.- Fakte ekzistas tri lingvo-tipoj : la flekciaj, la aglutinaj kaj la izolaj. La hindeŭropaj lingvoj estas flekciaj lingvoj. En ili la vortoj konas ŝanĝojn : *cheval – chevaux, je peux – nous pouvons*.

Cl.- Oni erare metis esperanton inter la aglutinaj lingvoj kiel la hungara, la finna aŭ turka. En tiuj lingvoj ofte la radikoj konas ŝanĝetojn laŭ la vortoj, kiujn ili formas. Kontraŭe la ĉina konas nenian malregulecon. En ĝi la radikoj restas absolute senŝanĝaj, kiel en esperanto. Similajn lingvojn oni nomas izolaj. Jen ekzemplo de la reguleco de la ĉina. La pronomo **mi** estas en la ĉina *wo*. **Ni** estas simple la pluralo de **mi** : *Wo men*.

A.- Tiu prelego pri la ĉina lingvo vekis multe da intereso.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!